

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 6an de marto 2014 per Skype.

(Protokolo aprobita la 10an de aprilo 2014.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim

Amelie Matt en Tromsø (ekde punkto 3)

Ulf Chr. Lunde en Os

Herman Ranæs en Trondheim

0. Tagordo

Aprobita. Mankas la sekretario, protokolos Jardar Eggesbø Abrahamsen.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 23an de januaro

Aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto ne povis ĉeesti, sed informis per retroŝto ke estas tiom da problemoj pri la signaturrajtaj formalajoj (vidu la protokolon de la 5a de decembro 2013), ke por ekhavi la bezonatan aliron al la banko ni anstataŭe provos sendi bankkontan formularon al ĉiuj estraranoj por subskribo.

3. Landa Kongreso 2015

Ni resumis la esplorojn ĝis nun kaj diskutis novan proponon, ĉu eblos aranĝi la Landan Kongreson en la BUL-kabano en Trondheim kiel en 2007.

4. Seminario 2014

Ni pludiskutis la jaman ideon pri seminario pri planlingvoj. Skiziĝis eblaj temlingvoj kaj prezentontoj.

5. Jarraporto kaj jarkalkulo 2013

La kasisto ne povis ĉeesti, sed mesaĝis retroŝte ke ŝi ekplanis la jarkalkulon. Forestis ankaŭ la sekretario, kaj ĉar kaj estas malfacile kunredakti la jarraporton sen li, ni decidis prokrasti tion.

6. ILEI-broŝuro

ILEI faris okpaĝan broŝuron, kiu estas plusendita al la estraro de NEL. Venis demando, ĉu ni traduku ĝin. Dum ŝajnis esti plena konsento ke la broŝuro estas alloga, Jardar kritikis ĝian enhavon pro troa uzo de i.a. miskomprenoj kaj mitoj. NEL eldonis novan broŝuron en 2012, kaj la konkludo estis ke ni ne bezonas jam novan broŝuron.

7. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–21:35.

Pro planitaj provizoraj forestoj okazis paŭzo 19:40–20:28.

Protokolis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 10an de aprilo 2014.